

## & Odo al Johano Gutenberg, la inventinto de preso:

< Rekante 22 el 43 batoj por strofo, entute 602 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Ján Hollý. El slovakia tradukis Magda Šaturová-Seppová (Slovakia antologio, 1977). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:43> (/mi miso somi re reerefa fami; mi miso soomimi re refa fami; mi dore miidodo Ti TiTi doLa; So SoSo doTi;

(#Rekantaĵe: mi miso somi re refa fami; mi miso somi re refa fami; mi dore mido Ti TiTi doLa; So Sodo Ti i)

)×14 )+

### (&Strofoj:

'1 Kiu vin, glora vir', laŭdi sufiĉe, ;  
glori kapablas, estimi vin scias ;  
Plenadekvate por ege utila ; Via sci-  
frukto? .....

(×: **Frapas tajparo, premas paperon ;  
Kapaj kaj frazaj venas literoj ;  
Libroj presiĝas en alta stako ; Frapas  
tajpar'**.)

'2 Kiu aŭtor' ja sub volbo ĉiela ; faris  
pli grandan, valoran inventon ; Por la  
utilo de febla homgento, ; Kiu entute!  
.....

'3 Kio ja, space flugadi facile, ; Ŝvebi  
tra silka aero al suno? ; Kiam al tero  
sekura post kurte ; Sinkos ni ree! .....

'4 Kio ja, el la kanonaj paftuboj ;  
Tondre elsendi detruan pafadon? ; Se ĝi  
nur morton, kruelajn aferojn ; Faras  
damaĝe! .....

'5 Vi la unua malkovris la arton ; Kiel  
kreaĵojn de homoj sciplenaj ; Taŭge en  
form' de presitaj folioj ; Prese eldoni.  
.....

'6 Dia invento! Antaŭe cent jarojn ;  
Kion cent manojn skribistaj pretigi ;  
Devis, ja tion nun eĉ ne post jaro ; Unu  
kapablas. ....

'7 Etaelspeze de tiam nun ĉiu ; Arton  
akiras por sumo negranda, ; Koron  
nobligas kaj mense surpaŝas ; Ŝtupon  
pli altan. ....

'8 Ĉiu ekscii jam povas facile, ; Kion  
per tuŝo de flamo dieca ; Kreis poetoj,  
aŭ de sciencistoj ; Mensoj ekkonis; .....

'9 Aŭ kiajn de la aferoj sekretojn ;  
Metis en lumon naturaj sciencoj; Kiaj  
en landoj antikvaj kaj novaj ; Agoj  
okazis. ....

'10 Por ĉi donac' vin famigas Danubo, ;  
Reĝa Tibero kaj riĉa Tamizo, ; Rejno  
dankema kaj Sejno blueca, ; Tajo  
potenca. ....

'11 Dankas Vistulo kun Volgo  
grandega; Maro Kaspia; vin eĉ mem  
Bajkalo, ; Nilo mem gloras kaj gloras  
vin hindoj ; Ĉiuj en kantoj. ....

'12 Son' vianoma ĉiam vastiĝados ; Kie  
la suno juneca eliras, ; Kie vespere sur  
maran surfacon ; Olde ĝi sinkas; .....

'13 Kie de norda frosteg' neplugata ;  
Tero rigidas; kaj kie sud-ardo ; Ege  
vastegajn sablejojn albrulas ; Per sia  
flamo; .....

'14 De homokuloj dum ne malaperos ;  
Tatroj slovakaj kaj dum ne de loko ;  
Steloj falegos, en fajro komuna ; Mond'  
ne pereos. ....)